

& Eŭropo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 7 minutoj. Poemon verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid per disduigi strofojn kaj versojn kaj doni melodion kaj rekantaĵon de Bresta balado, Norda Kantaro #4408.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/dolTi re3do doTi TiiTi;Ti La3La LaMi LaaLa;La LaTi doTi Ti Ti3;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×20)+

(&Strofoj:

'1 /E2l nekonataj, ŝlimaj ; abismoj de l' animo ;
Mi aŭdas strangan bruon, ; en malgraŭvola
timo,

(×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro
bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 Ĝin trapenstras krioj, ; kaŝitaj dum miljaroj,
; Grincado de la dentoj, ; metalo de fanfaroj,
.....

'3 En ĝi stertoras veoj, ; lamentas ploristinoj, ;
Tamburas ŝmacajn hakojn ; falintaj gilotinoj,
.....

'4 Susuron flirtas flustre ; truita silk' standarda
; Kaj ĉion fonas kraka, ; reeĥa boj' bombarda...
.....

'5 Analojn, postlasitajn ; de gentoj kaj prauloj,
; Mi sentas en angoro ; tra tempoj kaj nebuloj,
.....

'6 Antikvaj krimoj pete ; al mi etendas manojn
; Kaj forgesitaj lingvoj ; malbenas la tiranojn,
.....

'7 Haladzon spiras bruta, ; mensoga kaj
maldanka ; La tuta historio ; de mia raso
blanka,

'8 Nur kelkaj epizodoj, ; nur kelkaj bravaj
voĉoj ; Surlumas tiun muĝon ; de l' murdaj
sangdiboĉoj,

'9 En ili ĝermas savo, ; en ili – la lumturoj, ;
Pro ili solaj palas ; vizio de l' teruroj,

'10 Nur sur iliaj ŝultroj ; atlantaj de l' kelkopo ;
Sekure kuŝas sorto ; de l' krimulin' Eŭropo.

'11 Nur pro ilia sango, ; oferoj kaj ĉagreno ;
Retrovas la honoron ; la pala Magdaleno,

'12 Por naski novan idon, ; en la feliĉaj larmoj,
; Mesion liberigan ; de la katenaj armoj... ..

'13 Aŭskultu do, Azio, ; mamnutristino nia, ;
Afriko sfinkse muta, ; tribar' Oceania,

'14 Ĝemela kontinento ; de l' ambaŭ Amerikoj,
; Kunfratoj de l' estonto ; kaj dumaj
malamikoj.

'15 Aŭskultu kaj konfidu ; la jam proksiman
horon, ; En kiu nova sango ; trafluos nian
koron

'16 Ankoraŭ kelkaj limoj, ; hezitoj kaj decidoj
– ; Kaj kun la mirtaj branĉoj ; pilgrimos
blankaj idoj,

'17 Kuraci viajn vundojn ; kaj super la cikatroj
; Trasenti la hontigan ; brutecon de la patroj,
.....

'18 Starigi novan mondon ; de l' paco kaj
libero, ; Proklami la Laboron ; reĝino de la
tero... ..

'19 Tempestas la mistikaj ; abismoj de l'
animo, ; Sed jam vidiĝas lumo ; en nova
malproksimo

'20 Obee donas vojon ; laciĝo kaj miopo ; Al
kredo de l' estonto ; de la patrin' – Eŭropo.
)